Eŭropa Bulteno

Marto 2019, Numero 190

## SENSACIAJ REZULTOJ DE MULTLINGVA AKCELILO




La 28-an kaj 29an de marto 2019 okazis en slovena urbo Maribor la 3a kunsido de ĉiuj partneroj en la eŭropa projekto Multlingva Akcelilo – financata de Erasmus+. Partoprenis reprezenantoj de ĉiuj 9 partneroj el 6 landoj kiuj traktis la ĝisnun faritan laboron, planon por la lasta fazo de la projekto (ĝis la jarfino) kaj la ĝisnunanjn rezultojn.

La ĉefa laboro ĝis nun farita estas komplete finita: didaktika materialo por instrui minimuman Esperanton el proksimume 250 morfemoj por 7-9-jaruloj. La bazon kaj kunordigon faris Inter-kulturo el Maribor sub la gvido de Zlatko Tišljar baze de Zagreba Metodo kaj en preparado de instrumaterialoj partoprenis ankaŭ 2 elementaj lernejoj, el Šentilj (Slovenio) kaj Zagreb (Kroatio), kaj E@I el Slovakio.



Dum la ĝisnuna periodo okazis ankaŭ eksperimenta instruado per tiuj didaktikaĵoj en elementaj lernejoj en urboj Šentilj (Slovenio), Zagreb (Kroatio) kaj Vraca (Bulgario) kiuj atingis la finon kaj havos ankoraŭ ekzamenojn por taksi la rezultojn: scion de Esperanto kaj kiom tio helpas pli bone kompreni gramatikojn de aliaj

fremdlingvoj.




Kaj nun al la rezultoj. Kiel konate, la projekto celis krei instrumaterialojn por instrui mini-esperanton kiel fremdlingvaĵon kiu akcelos lernadon de fremdlingvoj (2an kaj postajn) ĉe infanoj kiuj scias nur legi (kutime dua- aŭ triaklasanoj). Tion ĝi atingis laŭ nunaj konsciiĝoj – sed pli detale oni scios post unu monato, kiam jam okazos ekzamenoj pri tio. Sed krom tio estis atingitaj pluraj neantaŭviditaj kromrezultoj.

1. Laŭ enketo inter istruistinoj, gepatroj kaj gelernantoj montriĝas ke ĉiuj estas tre kontentaj kaj ŝatas tiun lernobjekton. La infanoj ĝuas kaj amuziĝas sen rimarki ke ili ion novan lernis, la gepatroj trovas la akiritan scion tre utila kaj opinias ke tiu laboro estas bona por aparta okupiĝo de infanoj en kromlerneja agado kaj la instruistinoj tre bone fartas en la laboro kiu por ili estas pedagogie interesa kaj kreiva. Neniu el 43 infanoj, neniu el 5 instruistinoj kaj kvardeko da enketitaj gepatroj esprimis negativan opinion.
2. Kvankam laŭ la projekto la lernejoj estis devigitaj realigi nur 20 instruhorojn (2 lecionojn), ĉiuj tri lernejoj daŭrigis la instruadon por komplete fini ĝin (5 lecionoj kun 50 instruhoroj). Krome, ĉiuj gepatroj daŭre demandas ĉu oni daŭrigos la lernadon de E (kvankam tio ne plu rilatas al la ideo de Multlingva Akcelilo). Unu instruistino eĉ komencis instrui E-on laŭ la MLA-materialoj en supera sepa klaso. Oni devas substreki ke temas pri instruistinoj kiuj mem ne lernius E-on kaj lernas ĝin paralele kun la infanoj kaj ke tio ne estas ilia amatora aktiveco sed devo pro la tasko en la lernejo. Tiusence oni povas klare konstati, ke se lernejoj proponas al la gepatroj Esperanton kiel multlingvan akcelilon, neniu kontraŭas ĝin, kio estas kontraŭ la nuna konvinko de instruistaj instancoj
3. Iniciate de la instruistoj mem oni organizis interŝanĝon de la grupoj el Slovenio kaj Kroatio – kvankam por tio ne estas planita mono. Grupo el Šentilj venos la 9-an de aprilo vizite al Zagrebo kaj estos gastoj en la lernejo Retkovec en Zagrebo. Tio ja estis sekreta deziro de la projektaŭtoroj – ke infanoj vive renkontiĝu, tamen ili ne proponis tion pro manko de planita budĝeto. Konklude: la projekto tiom bone realiĝadas ke la partoprenantoj mem pretas pagi kostojn de tia interŝanĝo.
4. La gepatroj helpas al la infanoj lerni, kvankam ili mem ne konas E-on. Ili faras tion helpe de inetrreta kurso [www.learn.esperanto.net](www.learn.esperanto.net). Ili kredas ke la celo, ke la infanoj multe pli rapide lernos fremdajn lingvojn, realiĝos kaj ili ŝatus ke iliaj infanoj konu minimume 2 fremdajn lingvojn. Ili krome trovas ke tiu aktivado malpli grandigas la tempon de ilia nekontrolita okupiĝado en libera tempo laŭ tre bona kaj rekomendinda maniero.
5. Tre aparta rimarko unue de la bulgaraj instruistoj kaj poste ankaŭ de aliaj konstatas ke disleksiaj infanoj esence pli bone legas en Esperanto ol en la propra gepatra lingvo kaj jam lernata unua fremdlingvo.
6. La didaktikaj rimedoj kiuj enhvas multajn interesajn novajn, neklasikajn elementojn aparte povas esti fieraj pro atingaĵo de la Suddana Universitato gvidata de Eckhard Bick liu kreis programon per kiu la komputilo mem generos ekzercofrazojn por vidi ĉu ili sence

korektas aŭ ne kaj demandajn frazojn, kio ebligas ke la infanoj daŭre ricevas centojn da ekzercofrazoj kiujn ili uzas dum la hejma lernado inter la lernejaj horoj.

7. Jam antaŭe ni klarigis kaj nun ripetas. Multlingva Akcelilo havas spektaklan rezulton pro la ideo ke ĝin povas gvidi jam ekzistantaj geinstruistoj de iu ajn fremdlingvo. Tio signifas ke la enkonduko de tiu lernobjekto en la lernejojn ne dependas ke aparta edukado de novaj instruistoj. La lernobjekton instruas homoj kiuj ne konas Esperanton, sed lernas ĝin paralele kun la infanoj dank' al tiel kreitaj didaktikaj rimedoj kaj tiusence la ŝtato ne havas kostojn.
8. Sekve la du lastaj atingaĵoj estas io sensacio kaj neniam ĝis nun vidita en la institucia instruado.



La projekto daŭros ĝis la jarfino, kiam oni kreos ttt-paĝaron atingeblan de la ĝenerala publiko, geinstruistoj kaj gelernantoj, okazos ekzamenoj pri la atingita scio kaj pri tio kiom la scio helpas al la infanoj kompreni gramatikojn de aliaj fremdlingvoj kaj de la propra kaj ligas leksikajn konojn kun postaj leksikaj elementoj de fremdlingvoj kaj fine okazos lastaj enketoj pri la kontento de la geinstruistoj. Kompreneble, devas esti farita detala projektraporto por EU programo Erasmus+ kiu estos parte atingebla ankaŭ por ĉiuj interesitoj.

Zlatko Tišljar

# ESPERANTO PROPONITA POR NEMATERIA KULTURA HEREDAĴO ANKAŬ EN SLOVAKIO

La 29an de marto 2019 sendis SKEF (Slovakia Esperanto-Federacio) oficialan proponon al sia nacia instituto (apartenanta sub la Ministerio de kulturo) por enskribi Esperanton ene de la slovaka listo de la nemateria kultura heredaĵo. La titolo de la propono estas: „Jazyk esperanto - nositeľ slovenskej a esperantskej kultúry“ (Lingvo esperanto - portilo de la slovaka kaj Esperanta kulturoj).

La proponon akceptis kaj ties forsendos subskribis krom SKEF ankaŭ ĉiuj lokaj kluboj kaj organizoj kaj samtempe la junulara SKEJ (Slovakia Esperanta Junularo). Nun sekvos la procezo, dum kiu oni detale esploros la proponon, eventuale faros pliajn demandojn, postulos

pliajn dokumentojn ktp. Fine de la jaro 2019 oni devus informi pri la akcepto, eventuale malakcepto de la propono.
La proponon jam anticipe subtenis kelkaj gravaj slovakaj politikistoj, restas tamen nur esperi, ke la propono estu pozitive taksita kaj de la pritaksantoj, kaj de la ministrino de kulturo mem (kiu havas finan, decidan voĉon).

Se Slovakio sukcesus, temus jam pri la tria lando (post Pollando kaj Kroatio), kie Esperanto estus tiel ĉi agnoskita – kaj tio jam donus rekte la eblon, proponi Esperanton kiel mondan heredaĵon de UNESKO! Tio jam estus vere granda atingo, nepre indas provi ĝin kaj esperi pri ties sukceso! Ŝajne okazas preparoj ankaŭ en Litovio, por simile proponi Esperanton kiel kultura heredaĵo ene de sia lando. Ni esperu, ke ankaŭ tie oni sukcesos kaj ke Esperanto havos tiel eĉ pli grandajn ŝancojn sekve ebligi tutmondan enskribon!

Peter Baláž (Petro), SKEF-prezidanto

# VENU AL KONFERENCO EN TRIESTO

En Triesto inter la 24a kaj 31a de aŭgusto okazos Itala Esperanto-kongreso kaj komence de ĝi inter 25a kaj 26a de aŭgusto Konferenco de Eŭropa Esperanto-Unio pri la temo „Multlingva Politiko de EU en lernejoj“. Partoprenos ankaŭ eŭropa komisionano d-ro Vytenis Andriukaitis kiu faros enkondukan prelegon por ambaŭ aranĝoj. En la konferenco de EEU prelegos kvar prelegantoj. Jen la detala programo de Europa Konferenco:

Dimanĉon, la 25-an de aŭgusto:
- 10.00 inaŭguro de la Itala E-kongreso kaj Konferenco de EEU. Inaŭguran paroladon faros eŭropa komisionano d-ro Vytenis Andriukaitis
- 14.30-16.00 – En aparta ĉambro okazos interparolado de EEU-estraro kun Vytenis Andriukaitis (nepublika)
- Prelegoj de la konferenco de EEU:

16.30 d-ro Sean Ó Riain: Irlandaj spertoj de lernado de dua lingvo en bazaj lernejoj ekde 1922: kiel plilongigi la rezultojn?
17.30 mag. Zlatko Tišljar: Rezultoj de la projekto Multlingva Akcelilo kiun financas Eŭropa Komisiono per sia programo Erasmus+

Lundon, la 26an de aŭgusto:
9.00-10.00 inĝ. Jozef Reinvart: Vademecum de multdisciplina projekto: movebleco kaj inkluziveco en multlingva Eŭropo
10.00-11.00 ankoraŭ ne konfirmita prelego

Lundon, la 26an de aŭgusto posttagmeze:
- malferma kunsido de la asembleo de EEU por la asembleanoj de EEU kaj ĉiuj interesitaj kongresanoj de la Itala Kongreso – 90 min. Diskuto kaj akcepto de rezocio sendota al ĉiuj edukministerioj de EU
- kunsido nur por asembleanoj de EEU kun tagordo prezentata ĉi-sube – 90 minutojn.

Tagordo por la fermita kunsido de EEU–asembleo:
1. Malfermo de la kunsido: enkonduka parolo de la prezidanto dro Seán Ó Riain

2. Raporto pri la agado de EEU en 2018 (Zlatko Tišljar)
3. Raporto de la kasistino pri la jaro 2018 (Flory Wirdoeckt)
4. Diskuto kaj akcepto de la raportoj
5. Prezento de la laborplano por 2019 kaj skiza plano por 2020
6. Diskuto pri la loko kaj enhavo de la elekta asemblea kunsido en 2020 kaj EEU-konferenco
7. Diskuto kaj akcepto de la laborplano kaj Asemblea kunsido en 2020
8. Diversaĵoj

Mi refoje invitas ĉiujn kiuj ricevas ĉi tiun Eŭropan Bultenon kaj kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la tre gravaj aranĝoj en Triesto ĉi-jare pripensi tion kaj aliĝi laŭeble urĝe. Vi povas jam nun konsulti liston de aliĝintoj ĉe; https://kongreso2019.esperanto.it/aligxintoj/.

La programo de tiuj ĉi du aranĝoj estas sendube la plej abunda kaj alloga post la Universala Kongreso de Lahtio kaj kiu ne povas iri tien ĉu pro financaj ĉu pro aliaj kaŭzoj, venu al Triesto. Tie vi verŝajne partoprenos en histroria evento kie la EEU-konferenco akceptos dokumenton kiu invitos edukministeriojn en EU enkonduki eksperimente baze de la eŭropa multlingva poltiko kaj rezultoj de la projekto Multlingva Akcelilo tiun lernobjekton (Multlingva Akcelilo) kun subteno de eŭropa komisionano.

Zlatko Tišljar

## POST SUKCESA SES VENAS SEP – SOMERA ESPERANTO PROGRAMADO

Ĉu vi programas, grafikumas aŭ kodumas? Ĉu vi volas sperti mojosan Esperanto-semajnon kun aliaj spertuloj? Ĉu vi pretas krei, plibonigi aŭ realigi programon, retejon aŭ ludon kiu samtempe utilus aŭ rilatus al Esperantujo? Ne hezitu kaj aliĝu al SEP! La unuan fojon en la historio de Esperantujo ni invitas vin al SEP, la unua Esperanta kodumatono (angle hackathron)!



**Kio estas "kodumatono" (angle *hackathon*)?**
"Hackathon", kiun oni ankaŭ foje nomas kodumtago, kodumfesto aŭ kodfesto, estas fasona sprintec-evento, dum kiu programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, interfacfasonistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboras pri komputilaj projektoj.

La celo de "kodumatono" estas krei funkciantan programaron aŭ aparataron fine de la evento. Kodumatonoj kutimas havi specifan temon, kiu povas esti programlingvo, aplikaĵo, API. Foje limigoj entute ne estas. Fine de la evento oni prezentas sian pretan projekton. Ĉar programistoj ne mankas en Esperantujo, ŝajnis strange al ni, ke ĝis nun ankoraŭ neniu okazis, kaj pro tio ni decidis organizi SEP-on. Dum 7 tagoj ni programos, grafikumos kaj fasonos ĉiumatene.

E@I teamo do venas ĉi-jare kun nova projekto-evento: SEP (Somera Esperanto-Programado). Post la sukcesa okazigado de la jam famiĝinta kaj ĉiujara aranĝo SES (Somera Esperanto-Studado), kiu okazas regule ekde 2007, venis tempo por unu plia cifero kaj nova evento. Aranĝon SEP efektive proponis germana Esperantisto kaj poligloto Georg Jähnig, mem programisto. Ne daŭris longe, kaj la ideo ekhavis sian pli konkretan aspekton, kaj nun atendas sian realigon.

La aranĝo okazos dum la sama tempo kaj en la sama loko kun la aranĝo SES - ĉi-jare de la 12-a ĝis 20-a de julio 2019 en Nitra (Slovakio). La ĉefa diferenco inter SES kaj SEP estos ties antaŭtagmeza programo: dum SES oni lernos/praktikos Esperanton kaj dum SEP oni en la sama tempo (9:00-13:00) programos. Posttagmeza kaj vespera/nokta programo estos komuna por ambaŭ eventoj – tiel ĉi ja ankaŭ SEP-partoprenantoj povas ĝui la riĉan programon de SES.

Oni povas veni kaj krei propran projekton, teamiĝi kaj eĉ estos projektoj proponitaj de ni, kiuj estas elpensitaj tiel, ke ili helpu Esperantujon.

- 7 tagoj
- Unu temo
- Programistoj, grafikistoj kaj profesiuloj de la tuta mondo
- Matena programado
- Venu kun propra projekto aŭ laboru pri iu proponita

**Eblo subteni vian partoprenon (danke al UEA)**
Ĉu vi ŝatus veni, sed via financa stato ne estas momente tre pozitiva? Ĉu vi povus pli facile partopreni la eventon, se vi ricevus rabaton por la evento? Tiukaze ni havas bonan novaĵon por vi: UEA subvencias la aranĝon per 500 €! Tiun sumon ni planas dividi inter malpli pagipovaj partoprenantoj. Ni pretas kunfinanci pere de ĝi partoprenon de 5 el vi, po 100 € por ĉiu.

Se vi mem bezonas la subtenon, bv. kontakti nin ĉe sep@ikso.net laŭ la subaj kriterioj:

1. La kandidato sendu koncizan motivleteron ĝis la 30-a de aprilo 2019 je 12:00 (laŭ mezeŭropa hozono) al sep@ikso.net kun la titolo "Subvencipeto por SEP 2019".

2. La kandidato partoprenu plentempe la aranĝon kaj minimume 85% de la SEP-programo.
3. Prioritaton havas nepagipovaj partoprenantoj.

Rimarko: Eble ankaŭ aliaj organizoj/unuopuloj emos subteni la aranĝon (kaj iĝi partneroj/sponsoroj – tiukaze ni povos proponi eĉ pli da rabatoj por la kodemuloj! (Se eble eĉ iu el vi emas subteni la eventon, bv. skribi al ni ĉe sep@ikso.net por priparoli la detalojn.) Novaj utilaj retaj projektoj povas naskiĝi ankaŭ danke al via helpo! Anticipan dankon!

**Projektoj farotaj dum SEP:**
Laŭ la kutimo de *hackathon* (kodumatono), unue oni elpensas projekton, kiu kongruas kun la temo de la aranĝo kaj pasigas reston de la tempo prilaborante ĝin. Fine de la evento oni havas funkciantan aŭ eĉ finan version kaj prezentas ĝin al aliaj. Konsiderante, ke tio estas la unua kodumatono okazanta ene de Esperantujo, la temo estos ĝuste „Esperantujo“.

Ne estos limigo pri programoj, teĥnikoj aŭ manieroj por atingi la rezulton. Jes, vi legis ĝuste, vi povos uzi C++, HTML5, Ruby (por la mojosuloj), Python, vektoran grafikon, kaj se vi kuraĝas eĉ Microsoft Paint. Senlime lasu vian kreemon flugi en ĉiujn direktojn kaj elpensi ion, kio florigos nian mondon, ĉu via projekto estos utila retpaĝo por serĉi Esperantajn flagojn ĉe forumoj, grafikaĵoj uzeblaj por reklami kursojn kaj presi sur T-ĉemizojn aŭ programo, kiu generas hazaradajn Esperantajn konversaciojn.

E@I esperas okazigi SEP kiel ĉiu-jara evento, kiu ebligus al diversaj komputil-specialistoj renkontiĝi kaj kunlabori, kaj samtempe ebligus kreskon de novaj kaj utilaj projektoj por Esperanto-komunumo. Se do vi konas iun, kiu taŭgus por partopreni SEP, nepre sciigu lin/ŝin – Esperantujo povas bonfarti, nur se ni mem helpos ĝin evoluigi!
**Pli da detaloj: http://sep.ikso.net/**

Peter Baláž, E@I-kunordiganto

# TEJO ĈE UN JUNULARAFORUMO

Komence de aprilo ekos en Novjorko la 8a EKOSOK Junulara Forumo ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Jam de kvar jaroj TEJO aktive partoprenas en ĝi, kaj kontribuas en la rilatoj kun UN kaj en la gvidado de IKRJO - kunordigorgano por regionkontinentaj junularaj platformoj kaj por tutmondaj junularaj organizaĵoj.

Ĉi jare estos aparta jaro: TEJO ne nur partoprenos en la forumo, sed la ĉefparolanto por la junularo dum la Fermo de la Forumo estos Rakoen Maertens. Tio estas tre grava rekono por nia movado, por la agado de TEJO ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kaj por la kvalito de niaj aktivuloj. Estas ĵus konfirmite ke la Ĝenerala Sekretario de UN partoprenos en la Ferma Ceremonio de la Forumo - ĝuste kiam Rakoen alparolos la ĉeestantojn.

Francesco Maurelli, vicprezidanto de TEJO

# POLYGLOT GATHERING 2019 – LA TRIAN KAJ LA LASTAN FOJON EN BRATISLAVO




Ĉu vi emas lerni diversajn lingvojn? Ĉu vi emus iĝi aŭ jam estas plurlingvulo (poligloto?). Tiukaze vi devus nepre partopreni la eventon „Plurlingvula kunveno“ (angle „Polyglot gathering“). Temas pri la renkontiĝo, kie oni povas ĝui multajn prelegojn, metiejojn, renkonti multajn famajn poliglotojn, konatiĝi kun interesaj homoj de diversaj mondopartoj kaj motiviĝi en lingvo-instruado. Ĝi estas la plej granda renkontiĝo de poliglotoj en la mondo – lastjare partoprenis 538 homoj el 60 landoj (kaj ĉi-jare oni atendas ĉ. 600 partoprenontojn)! Krome – ĝin fondis esperantistoj en Germanio (dum la tri unuaj jaroj ĝi okazis en Berlino), kaj esperantistoj kaj Esperanto plu ludas ene de la evento tre gravan rolon (E@I, kiu ĉeforganizas ĝin, uzas Esperanton kiel sian laborlingvon ĉiutage en sia oficejo en Slovakio). Ĉi-jare la aranĝo okazos jam la trian (kaj la lastan) fojon en Bratislavo de la 29a de majo ĝis la 2a de junio. Kutime, ĉirkaŭ 25-30% da partoprenantoj komprenas kaj/aŭ scipovas Esperanton. Nia lingvo nun estas la 9a en la listo de pli ol 80 scipovataj lingvoj de la ĝisnunaj aliĝintoj.

Se la temoj rilataj al lingvoj estas por vi interesaj, nepre venu – okazos multo, kio kaptos vian atenton! Kutime okazas pli ol 100 programeroj dum la evento, inkluzive de paneldiskuto pri lingva politiko/justeco, diverslingvaj prelegoj pri efika lingvo-instruado, metiejoj pri nekutimaj lingvoj, lingvaj kvizoj, plurlingvaj koncertoj ktp.

Vi tamen povas veni ĝui ankaŭ partojn de pure Esperanta medio: ne mankos gufujo, kulinara festivalo, interkona kaj internacia vesperoj, koncerto de la germana Esperanto-stelulo “Kaŝi”, aligatorejo kaj eĉ prelegoj en Esperanto (pasintjare la plej juna preleganto estis la 13-jara esperantisto el Ruslando Pjotr “Peĉjo” Fedosov).

En la pasinteco EAB kaj UEA subtenis la renkontiĝon per sponsorado – ankaŭ danke al tio povis okazi, ekzemple, kurso de Esperanto fare de la brita Esperanto-instruisto Tim Morley, kiu ravis ĉeestantojn en sia kreiva metiejo “Esperanto in 100 minutes”. Espereble kunlaboro kun gravaj Esperanto-institucioj daŭros ankaŭ ĉi-jare kaj en la estonteco – tio ja signife levas nivelon de la Esperanto-prezentiĝo.

La komunumo de poliglotoj estas tre proksima al tiu de esperantistoj. Temas ofte pri tre malfermitaj, scivolemaj homoj, kiuj emas kompreni alies vidpunktojn kaj kulturojn. Certe tiu grupo estas unu el la plej proksimaj “aliancanoj” por la esperantistoj.

Dum unu monato ekde la lanĉo de la aliĝilo (1.1.2019) aliĝis jam 180 homoj el 38 landoj, kiuj kune kapablas paroli 83 lingvojn! Tial estas antaŭvidate, ke ĉi-jare povus la evento superi eĉ

600 partoprenantojn, kio estos plia rekordo ene de la poliglota komunumo. Espereble ankaŭ vi estos inter ili!

La Poliglota Kunveno en 2020 ŝanĝos sian landon. Se vi emas (re)viziti Slovakion kaj samtempe poliglotumi, ĉi-jare vi havas la lastan ŝancon.
Detaloj pri la evento (angle): [www.polyglotbratislava.com](http://www.polyglotbratislava.com)

Peter Baláž, E@I-kunordiganto

## SPECIALA PROGRAMO POR GEKNABOJ DUM LA TRIESTA KONGRESO

La gepatroj esperantistoj, kiuj partoprenos la 86-an italan kongreson de esperanto en Triesto, aŭguste, povos ĝui iom da libereco kaj trankvilo. La gefiloj havos programeron por ili elpensitan en laborlingvo Esperanto. Do mankos kialo por ne partopreni tiun ĉi kongreson ĝuste pro la idoj. Informojn pri la aranĝo prenu el la kongresa paĝo!

Edvige Ackerman




## LA 7A EŬROPA FESTIVALO DE ESPERANTAJ KANTOJ

La festivalo okazos la 25-26an de majo 2019 en Vroclavo (pole: Wrocław) en prestiĝa loko Filharmonio, strato Piłsudskiego 19.
La 25an de majo – Provaŭdo de la partoprenantoj
La 26an de majo –Koncerto de la premiitoj
La festivalo okazasĉiujare en majo en du kategorioj:
1. koruso aŭ ensemblo,
2. solisto.

Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en la gepatra aŭ ajna fremda lingvo.
Pritaksataj estas nur la kantoj en Esperanto.

## KION MI ESPERAS DE PLI BONA EŬROPO?

1. Konsekvence ne pli da bonstato, sed pli bone distribuita bonstato.
2. Konsekvencan deturnon de la principo de ekonomia kreskado je kostoj de la materialaj kaj sistemaj resursoj de nia unu komuna Planedo.
3. Konsekvencan realigon de la Agendo 2030 kun pruvo kaj kontrolo de social-ekologie akordiĝema ekonomia kreskado.

4. Konsekvence ĉiujn resursojn de la ekzistoprizorgado en publika kontrolo.
5. Konsekvencan klimato-neŭtralecon de ĉiu agado pere de reduktado, kompensado kaj adaptado.
6. Konsekvence justan komercon kun la ekonomie pli malriĉaj regionoj.
7. Konsekvencan observadon de social-ekologiaj normoj por ekspluato, distribuo, importo kaj prilaborado de materiaj resursoj kaj naturproduktoj.
8. Konsekvencan konservadon/plivastigadon de la subsidiarprincipo.
9. Konsekvencan akcepton/prizorgadon kaj distribuadon de rifuĝintoj kaj persekutitoj.
10. Konsekvencan enkondukon kaj utiligadon de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj.

Wolfgang Günther, Membro de la Asocio de Verduloj Esperantistaj – AVE

# OFERTATAJ DOKTORIĜAJ STIPENDIOJ ĈE ULSTERA UNIVERSITATO

La Alianco pri Doktoraj Trejnadoj (University Alliance) de UA (DTA3) proponas "Marie Skłodowska-Curie" stipendion ĉe la Fakultato de Aplikataj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj en la Ulster University. La doktoriĝanta studento devas labori sub la superrigardo de Dr M.Gazzola kaj de Profesoro G. Marnoch (ambaŭ ĉe Ulster University), kaj d-ro B. Carey (Trinity College Dublin) pri projekto pri lingvopolitiko, lingva justeco kaj inkludo. Por pliaj informoj, inkluzive kiel kandidatiĝi, bonvolu viziti https://unialliance.ac.uk/dta/cofund/

Michele Gazzola

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.
Finredaktita: la 31-an de marto 2019
Redaktoro: Zlatko Tišljar
En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Peter Baláž, Michele Gszzola, Wolfgang Günther, Francesco Maurelli, Edvige Ackermann

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com
Retpaĝo: http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto-Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu